

La unua fazo de la gesta instruado de esperanto

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-800/246, 1979 februaro 08 kaj 10

http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-35/SRI-1979-35-A-3-246-800-1979_02_08_10_Claude-Gacond-La-unua-fazo-de-la-gesta-instruado-de-esperanto.mp3

Cl.- Parolas Claude Gacond pri la gesta instruado, kiu povas alporti multajn helpojn en la esperanto-instruado lerneja. Ĝuste pri tiu ĉi gesta instruado mi havis la okazon eksperimenti dum unu jaro en elementa lernejo. Mi diras tiujn ĉi klarigojn. La instruisto ekde la unua minuto esprimas sin nur en esperanto, eĉ por doni klarigojn. Li agas kaj instigas la gelernantojn fari la samon per gestaj ekzercoj, ludoj, konkursoj, divenaĵoj, esperanton li instruas laŭ tre preciza programo. Mi donis pasintan semajnon ekzemplon pri la tuta komenco. Do la instruisto parolas, gestas, la infanoj imitas lin. Kaj poste, post tiu inica fazo, kiu instruas ĉefe verbojn, mi diris ke la instruisto nun instruas iomete pli la konjugaciajn formojn ekzemple pere de dialogoj kaj ĉefe pere de prokrastitaj ordonoj. Jen hodiaŭ mi prezentas al vi ekzemplojn de dialogoj kaj de prokrastitaj ordonoj, parolante pri tiu ĉi formo tre tipa de la gesta instruado.

Dialogoj. Kiuj dialogoj por instrui la konjugaciajn pronomojn estas tiaj? La instruisto faras demandojn, al la lernantoj respondi:

- Ĉu mi staras ?
- Jes vi staras.
- Ĉu mi sidiĝas ?
- Jes vi sidiĝas.
- Ĉu mi sidas nun ?
- Jes, vi sidas.
- Ĉu Pierre kuras?
- Ne, li ne kuras, li kuŝas sur la planko.
- Ĉu Josiane kantas ?
- Ne, ŝi silentas.
- Ĉu Ivan kaj Carole sidas ?
- Jes, ili sidas.
- Ĉu ni lernas esperanton ?
- Jes, ni lernas esperanton.
- Ĉu la plafono estas blanka ?
- Jes, ĝi estas blanka.
- Ĉu oni parolas per la oreloj ?
- Ne, oni parolas per la buŝo kaj lango.

Do, kiel faros la lernantoj por ekzakte korekti sin ? Ĝenerale tiel : la profesoro faras la demandon. Li faras ĝin du-foje, ĉar la lernantoj kutimiĝas respondi nur post aŭdado de du-foja demando, kio helpas ilin klare kompreni. Ili provas respondi kaj la profesoro alportas la apogon, la asekuron. Li poste donas la bonan respondon kaj la lernantoj ripetas tiun bonan respondon. Iom post iom ili kutimiĝas tuj doni la bonan respondon kaj poste atendas la ripeton de la profesoro, por havi asekuron, se vi volas, firmigon de sia respondo, kaj ripetas.

La prokrastitaj demandoj, ordonoj havas tiun ĉi celon : instrui la konjugaciajn formojn en la tempo. Jen tipa ekzemplo. La profesoro diras : sidiĝu kaj aŭskultu !

Kiam vi frapos sur seĝon, vi stariĝos, kiam mi frapos sur seĝon vi stariĝos kaj vi kuros ĝis pordo. Vi frapetos ĝin tri foje kaj vi revenos marŝante kaj vi sidiĝos sur la plankon.

Atentu, mi ripetas :

Kiam mi frapos sur seĝon vi stariĝos kaj vi kuros ĝis pordo. Vi frapetos ĝin tri foje kaj vi revenos marŝante kaj vi sidiĝos sur la plankon.

Atentu, agu, mi frapas !

Do la lernantoj, kiel mi diris, ĉiam atendas duan ripetan donon de la ordono, kaj ĝenerale la vorton ‘agu’. Tio helpas ilin discipline labori. Tiu disciplino estas ege grava, ĝi devas revenigi la silenton en taŭgaj momentoj kaj ĝi donas la eblon al la lernantoj orde ekagi.

La gesta instruado necese do baziĝas sur tiu strikta disciplino. Profesoro, kiu ne povus akiri ĝin, kiu lasus konstantan brueton ĉirkaŭ si, ne povus bone instrui laŭ tiu metodo. Iom post iom kelkajn ordonojn oni povas skribi disdoni helpe de slipoj. Grupe aŭ individue, sub la kontrolo de kamarado, tiujn ordonojn oni deĉifras kaj plenumas. Ili kondukas al precizaj agoj. Serĉado de bildoj fiksitaj sur la flaneltabulon, aŭ disdono de bildoj al precizaj lokoj, kiujn eble aliaj iros preni. Ankaŭ estas mim-ekzercoj, skeĉoj kaj divenaĵoj. Tiuj ekzercoj kun la skribaj ordonoj anstataŭas iom post iom la parolajn ordonojn. Ili favoras iom post ioman studon de la skriba lingvo kaj laboron individuan. Helpe de ekzemplaj vortoj, la karakterizaĵoj de la fonetika skribo esperanta povas esti prezentita pere de slipoj fikseblaj sur la flanelotabulon. Nur konvenan legadon oni celas. Se la gelernantoj propèonas skribajn respondojn, plej fantaziajn skribmanierojn oni akceptas. Kiam la infanoj lernas skribi en la propra lingvo, estas grave ne perturbi ilin pere de fremdaj skrib-reguloj. Cetere, la gelernantoj de la kvara kaj kvina klasoj en la elementa instruado nur malrapide malkovras la malsimilecon inter la nacilingva kaj la esperanta skribmaniero. Taŭgas limigi sin do, alporti klarigojn nur kiam ili faras demandon precizan, kaj tio ĝenerale ĉiam en esperanto. Mi diris, ke ekde la unua momento oni nur parolas en esperanto. Tiucele, por doni la klarigojn, la instruisto devas havi je dispono kovertojn kun serioj precizaj da slipoj por ĉiu demando. Tiuj kovertoj estas ege utilaj.

Ekzemple, lernanto franclingva rimarkis ke la sono ‘u’ skribiĝas kun unu litero, per unu litero en esperanto, kontraŭe al la franca lingvo, kie oni metas du literojn ‘ou’. Koverton kun aro da vortoj ‘u’-sonaj ili ricevas. Tiel li povas firmigi sian malkovron, vicigante tiujn ĉi slipojn kaj legante la koncernajn vortojn al la kamaradoj. ‘Ĉu’, ‘unu’, ‘du’, kaj tiel plu, ĉiam vortoj kun ‘u’. Estas tre grave ke ĉiu infano povu refari tiujn ekzercojn en la taŭga momento, tio signifas, kiam ili malkovras la regulon. Kaj ke ili povu proponi tiun regulon al la aliaj. Estas simptome, ke la plej mallertaj infanoj poste venas kaj ĝenerale ili imitas la kamaradojn, ili poste diras, ke ili malkovris la regulon kaj tiel ankaŭ ili fieras montri la regulon. Kaj por la aliaj estas ripetado, re-aŭskulto kaj ankaŭ aŭskulto, ĉu la plej mallerta eldiras tion ĝuste, laŭ ĝusta maniero.

Serio da ludoj permesas regule ripeti la gramatikajn skemojn kaj precizan vortaron. Inter ili la gelernantoj ŝategas tiun de la statuoj, kiu estas senfine adaptebla al ĉiuj eblaj situacioj. Pri tiu ĉi ludo kontrola ni detale raportos venontan semajnon.

Vi aŭdis el Svislando prelegon pri la gesta instruado, kio estas tre efika en la elementa instruado de esperanto. Dum la venontaj semajnoj ni daŭrigos tiun prezenton. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!